**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz
MAJO 1999

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

Tie vi trovos interalie: Informoj pri kio estas E-o, esperante kaj hispanlingve. La revuo "Gazeto Andaluzia" en esperanto. La hispanlingva bulteno "Monate ĉe vi. Radio Saluton!. Forumo "Agora" (por afiŝi mesaĝojn en esperanto, kvazaŭ novaĵgrupo). Paĝo de Grupo Nifo, eldonantoj de sciencfikcio en esperanto.. Informpaĝo de la kantisto "Solo". Serĉilo "Metaserĉ" (ne tiom bona kiel Yahoo!, sed tre origina). Kurso de Esperanto "Esperanto Viva!" en la hispana. Trarigardo de Esperanto-Gazetaro, de Pola Radio

## EXPOLINGUA 99

Okazis en Madrido de la 22a ĝis la 25a Aprilo EXPOLINGUA 99, internacia ekspozicio pri instruado de lingvoj (16.000 vizitantoj). Unuafoje partoprenis ĝin nia Hispana E-Federacio kun bele prizorgita stando. Miloj da vizitantoj (2.000), inter kiuj abundis studentaj junulINoj, adoleskINOj kaj gimnazianiINOj, surprizitaj pro la novaĵo, atente trarigardis la librojn, gazetojn kaj diskojn elmontritajn en nia stando, kunportis broŝuron (triptiko) pri nia lingvo speciale eldonitan far nia Federacio por ĉi okazo, kaj konkursis je lotumo de kvar senpagaj kursoj de Esperanto. Por partopreni la lotumon, la konkursantoj devis lerni lecioneton kaj skribe plenumi tre simplan ekzercon. Tio vekis entuziasman respondon (300 personoj) , precipe de junaj gestudentoj (kurioze la kvar gajnintoj estis viriINOj). Vekis rimarkindan atenton la konstanta prezentado per televidilo de la vidkurso "Mazi en Gondolando", kaj komputilo prezentanta la novan TTT-paĝon de H.E.F. (*www.esperanto-es.org*). Diversaj televidoj kaj radioemisoroj intervjuis al esperantistoj kiu atendis la stando. Nia partopreno en Expolingua estis, do, enorme sukcesa.

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

La Vanguardia 1999-03-10. En kunveno pri naciismoj en Barcelona Universitato, la vaska kaj la galega reprezentanjoj uzis aŭtomatan tradukon pri la vortoj de majorka, kataluna kaj valencia reprezentantoj, ili parolis hispane aŭ kiel ili diris “duoninsula esperanto”

“La esperanta: ĉu literaturo por paco?” estas la titolo de la parolado kiun prelegos Giorgo Silfer kadre de la 32ª Internacia Literatura Konferenco dum la printempa kongreseto de la poetoj en PEN-klubo (ĵurnalista/verkista asocio)

La 28an de marto la E-elsendoj de Pola Radio komencis novan viv-periodon. La estraro, post minaco entute fermi la E-redakcion, decidis daŭrigi ilin, sed duontempe. Jen la horoj kaj frekvencoj laŭ la monda tempo: 13,30h -7285 kHz, 7225 kHz (bendo 41,18m, 41,52m); 18,00h –6095 kHz, 7205 kHz (bendoj 49,22m, 41,64m); reaŭdigoj per satelito Eutelsat en la sekva tago: 06.00 kaj 08.30.

## ESPERANTO EN INTERRETO

Dum marto estis registrita vizito unu miliono al al informejo de Sveda Esperanto Federacio (http://www.esperanto.se). La kavanto da vizitantoj kreskas kaj atingas nun 90.000 ĉiun monaton.
Pere de servilo altavista oni povas atingi inter pli ol unu miliono da TTT-paĝoj pri esperanto.

**MEMBRARO DE UEA EN 1998**

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| HISPANIO: | Aligitaj membroj: | 320 | Individuaj membroj: | 190 | SUME: | 510 |
| TUTMONDE (120 landoj) | “ | 12.782 | “ | 7.359 | “ | 20.141 |



**HEF ANGULO**

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.org

HEF eldonis novan buntan kaj profesie desegnitan triptikon por amasa informado en Expolingua. Post ĝia disdonado en tiu evento, ni prezentos ĝin en la venonta nacia kongeso. Ĉiuj grupoj rajtos ĝin uzi.

**HOMAĜO AL JUAN REGULO**

Patro kaj parto el la Kanaria Esperanto-Historio ricevis pasitaj aprilon homaĝon en lia naskiĝinsulo La Palma. En lia naskiĝurbeto Garafía oni malkovris tabulon liahonore, eĉ en la ĉefurbo Santa Cruz de La Palma alia marmora tabul-memoraĵo.

**REKOMENDOJ POR NOVAJ VORTOJ**

La konsulta komisiono, ricevinte demandojn pri la vortoj *inline skates, snowboard, halfpipe,*
*mountainbike, gameboy*, rekomendas: Por *inline skates*: rulŝuo, jam vaste uzata, estas ŝuo kun radetoj aranĝitaj unu- aŭ duvice; do por *inline skates* ni rekomendas "unuvicaj rulŝuoj". Por *snowboard*: glit(o)tabulo - unuobla skio, sur kiu starante ambaŭkrure oni glitas laŭ neĝa deklivo. Tolerebla ŝajnas ankaŭ la termino "neĝtabulo". Por *halfpipe*: duontubo - tiuforma instalaĵo por pendole veturi en ĝi per rultabulo. Por *mountainbike*: mont(o)biciklo, montarbiciklo - fortika biciklo taŭga por veturi sur natura kaj dekliva tereno (terenbiciklo). Por *gameboy* (varnomo): ludkomputil(et)o - tiuspeca portebla aparateto kun ludprogramo, precipe por infanoj. Krome oni demandis, ĉu la terminoj "posxtelefono" kaj "kompaktdiskilo" estas akcepteblaj. Tion la konsulta komisiono jesis, aldonante ke por portebla kompaktdiskilo sufiĉas kutime ankaŭ la termino "poŝdiskilo". La konsulta komisiono atentigas, ke tiuj ĉi rekomendoj ne estas decido de la Akademio de Esperanto. Lingvajn demandojn ĉiu povas direkti al la direktoro de la konsulta komisiono: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio; <*maul@newsfactory.net*>

**AUGUSTO PRELEGOS EN POLLANDO**

Inter la tre elstaraj profesoroj kiuj gvidos la diversajn kursojn en la 20-a Sanmarineca Universitata Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj en Bydgoszcz, (Pollando), troviĝas nia kara kaj nelacigebla Augusto Casquero, kiu disertacios pri “Kulturo kaj lingvoj de Hispanio”.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelego: 17-a de majo “Hispana printempa folkloro” Projekcio de lumbildoj.

Kursoj:Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas).
Baza kurso, merkrede 18.30 ĝis 19.300. Profesoro Antonio Tur